

G.L. GIMELLI


# ITALA fervojisto

Nº 03 1967

**Organo Associazione Italiana Ferrovieri Esperantisti**









IFEA

## 19-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

### FULDA (Germanio) 6 - 12 de majo 1967-a

La jara kongreso de Fervojistoj-Esperantistoj okazis ĉi jare en la germana urbo Fulda, de la 6-a ĝis la 12-a de majo. La perfekta organizado fare de la germanaj kolegoj impresis nin ekde la "Interkona Vespero" dum estis prezentitaj la uniformoj de staciestroj kaj trajnestroj de la partoprenantaj nacioj. La elekto de "Oranĝerio" kiel kongresejo estis la plej taŭga. Situanta ĉe la limo de la baroka kvartalo, apud la granda Paŭlus pordego, kun siaj mirindaj salonoj kaj sia grandega parko, ĝi estis inda teatro por ĉiuj manifestacioj de la kongreso. En la resideja palaco, iam sidejo de la Princoj-Episkopoj, nun de la komunumaj instancoj, estis pretigita ekspozicio tre vizitata de Esperantistoj kaj ne Esperantistoj.

La kongreso estis malfermata oficiale, dimanĉon de la Prezidanto de I.F.E.F., s-ro De Jong. Post la bonvenigaj vortoj de la Prezidanto de L.K.K. s-ro Giessner, adresis al la kunvenantoj kuraĝigajn kaj gratulajn vortojn d-ro Schlesser, Prezidanto de F.I.S.A.I.C., sub kies aŭspicoj disvolviĝis la kongreso; la reprezentantoj de la Ĝenerala Direkcio de Germanaj Fervojoj kaj de diversaj Sindikatoj, la Vic-urbestro de Fulda kaj f-ino Vermaas, Direktorino de la centra oficejo de U.E.A.. Finfine la reprezentantoj de 18 eŭropaj landoj alportis la salutojn kaj bondezirojn por fruktodona laboro, en la nomo de siaj naciaj asocioj.

Ĉiuj aplaŭdis al fest-parolado de d-ro Bormann (de la Hamburga Universitato) kiu fermis la solenan inaŭguron.

Tre simpatia kaj kuraĝa iniciato, kiu, ni esperas, trovos daŭrigantojn, estis la prezentado, en Esperanto, de tre interesa teatraĵo, kiu jam atingis proksimume 1200 prezentadojn sur la germanaj scenejoj: "Ĉu vi konas laktovojon?". La aŭtoro, ĉeestanta, estis longe aplaŭdata, kiel ankaŭ la sindonaj kaj tre lertaj rolantoj s-roj Thierry kaj Audibert el Parizo.

La komitatanoj de I.F.E.F. estis okupataj dum multaj horoj preskaŭ ĉiutage, en diversaj fakaj kunsidoj pri la komitat-laboroj, pri la fakaj terminaroj kaj prelegoj kaj pri la junularaj problemoj. Inter la decidoj ni rimarkas la eniron de nia Federacio en kadron de F.I.S.A.I.C., la prezentadon de faka terminaro kaj la tradukadon Esperante de la internacia konvencio por fervoj-trafiko, la elekton de Ĉefkomitatano, la svisa kolego Greutert, de komitatano de U.E.A., la hungara kolego D-ro Bacskai, kaj de sidejoj de la venontaj kongresoj.

Belegaj ekskursoj, baloj kun la partopreno de la fervojistoj de Fulda kun iliaj gefamilianoj, artaj vesperoj, blovorkestr-koncertoj, bankedoj, akceptoj flanke de aŭtoritatuloj, ĝojigis kaj variigis la posttagmezojn kaj vesperojn de la kongresanoj. Sed ili estis kortuŝitaj je la inaŭguro de du Esperanto-stratoj: en Fulda kaj en Hilders. Alia emocia manifestacio okazis dum vizito al granda fervoja riparejo de Fulda, kie la Direktoro kaj la Personarestro adresis al la kunvenantoj noblajn kaj laŭdajn vortojn.

Du fakprelegoj, originale verkitaj en Esperanto, kiuj temis pri "Skribaj ordonoj al trajnoj kaj substituaj metodoj"; (ĝi komparis gravaĵojn el 11 landoj); kaj "La aŭtomata trajn-bremsigo", altiris grandan publikon, ĉar la brila, klara kaj detala ekspono kaj la samtempa ilustrado per lumbildoj kaj modeletoj, taŭge komprenigis temojn tiel malfacilaj, ankaŭ al ne fakuloj.

Entute tre interesa semajno, kie ĉio perfekte funkcias, kie ĉio, ĉiam estis en sia propra loko, kie oni faris eblon por agrabligi la restadon al la eksterlandaj gastoj. Loka Kongresa Komitato efikega, kies Prezidanto ricevis por ĉiuj anoj, la dankojn kaj gratulojn de la partoprenantaro.

La bela semajno finiĝis per "ĝis al Varna", ĉar la 20-a IFEF-Kongreso okazos en la Bulgara urbo Varna, ĉe Nigra Maro, de la 11-a ĝis la 17-a de majo 1968-a.

ESPERANTO-TAGO OKAZE DE LA INAŬGURO DE LA BILDO DE "NIA SINJORINO DE LA ESPERO" PATRONINO DE LA ESPERANTISTOJ - ROMO la 25-an de aprilo 1967-a.

Kiel anoncite, la 25-an de aprilo okazis en Romo Esperanto-tago okaze de la inaŭguro de la pentraĵo de "Nia Sinjorino de la Espero", patronino de la Esperantistoj. La tago komenciĝis per solena ĝenerala aŭdienco de la Sankta Patro, Papo Paŭlo la VI-a. Ĝi okazis solene en la Baziliko de Sankta Petro plen plena da fidelulој el la tuta mondo kaj la Papo menciis, inter la ĉeestantoj, ankaŭ: "grupo da katolikoj Esperantistoj". Poste la restoracio kunigis ĉiujn partoprenintojn por komuna tagmanĝo.

Posttagmeze ĉe la preĝejo "Cristo Re" okazis la komuna fotografado kaj, en la kinejo de la paroko, la inaŭguro de la bildo. Prof-ino D-ino Adelaide Antonelli Kohler, Prezidantino de la Roma Katolika Esperanto-Centro, salutis la ĉeestantojn ankaŭ en la nomo de Patro Giacinto Jacobitti "Deus ex machina" de la manifestacio. S-ano Kav.Luigi Minnaja, parolinto de Radio-Roma Esperanto-fako, prelegis pri historio de la Madono de la Espero kaj kiel ŝi fariĝis protektantino de la Esperantistoj. Prof.Carlo Agostini, Ĝenerala Direktoro de "Itala Instituto de Esperanto" prelegis pri "Ekumenismo kaj Esperanto". Kav.Minnaja prezentis lumbildojn pri siaj Esperantaj memoraĵoj, precipe pri la tradicia "Sermono de la Nacioj" (kiu okazas ĉiujare en Romo), en kiu viciĝas paroladoj, kantoj diverslingvaj, kaj eĉ koreografioj de geinfanoj, inter kiuj ankaŭ diversaj kiuj parolas esperante, honore al eta Jesuo.

Ĉeestis la simpatian manifestacion ankaŭ nia Prezidanto de I.F.E.A. D-ro Prof.inĝ. Bernardino Lattanzi di Monterubiaglio.

La bela tago finiĝis per la Sankta Meso Esperantlingve Diservita de Pastro Jacobitti helpata de Pastro Ciccanti.

MEMORAĴO DE NIA KARA "PAĈJO": JULIO BAGHY

La 26-an de aprilo la Bologna Esperanto-Grupo kunlabore kun nia Asocio I.F.E.A. memorigis la grandan Esperanto-verkiston Julio Baghy kiu mortis la 18-an de marto en Budapeŝto. La memoriga okazintaĵo estis anoncita ankaŭ per radio kaj ĉiutaga gazetaro.

La sekretario de IFEA S-ano Germano Gimelli legis kritikan eseon kaj biografiajn notojn pri nia kara "Paĉjo" kaj evidentigis la sentimentalan, idealisman kaj satiran entenon de liaj verkoj. Laste S-ano Gimelli legis fragmentojn de liaj poezioj cerpitaj el la poemoj "Preter la vivo" kaj "La vagabondo kantas". La preleginto finis per legado de nepublikigitaj poezioj kiujn Julio Baghy sprite sendis al li en diversaj okazintaĵoj.

INAŬGURO DE ESPERANTO-STRATO EN VERONA

Dimanĉo la 4-an de junio okazis en Verona inaŭguro de Esperanto-strato fare de la lokaj fervojistoj-esperantistoj kunlabore kun la Verona Esperanto-Grupo, en la kadro de la manifestacioj pri la kvindekjara datreveno de la morto de nia Majstro D-ro L.L.Zamenhof.

La manifestacio komenciĝis per la Sankta Meso en Esperanto, kiun celebris Pastro A.Ciccanti, ĉe la tabulo de la nova strato kiu trairas la internacian kvartalon de la "Industria Zono". Faris la festparoladon D-ro Fabris je la ĉeesto de urbaj aŭtoritatuloj kaj de la Ambasadoro de Pollando.

Poste la multnombraj gepartoprenantoj per longega kaj orda vico da automobiloj atingis la urban centron kie en la salono de la mirinda palaco "Gran Guardia", juvelo de la fama Placo Brà, okazis la oficialaj paroladoj de la Urbestro, de la Ambasadoro de Pollando, kaj de la reprezentantoj de diversaj urbaj instancoj. Fermis la unuan parton de la manifestacio la prelego de D-ro Mario Dazzini sur la temo: "Esperanto en la vivo kaj en la lernejo, kvindekjaroj post la malapero de sia iniciatinto".

Post la komuna tagmanĝo en la luksa restoracio "Pedavena" kie grupiĝis simpatie la pli ol 200 gepartoprenantoj, okazis neatendita loterio: premiojn ricevis preskaŭ ĉiuj gepartoprenantoj. La Bologna gesamideanoj gajnis la po-

**Mankas paĝoj 3—4**